| Naam en adres van de afzender | Nom et adresse de l'expéditeur |
|---|---|

A. R. E
Reigerlaan str 10
BEERNEM

POSTKAART

CARTE POSTALE

Estimata samideano,
Jes la adreso de mi
ĉiuj estas la supre
menciata. Bonvole
pagu abonon ankaŭ
por HEROLDO de esp.
por sinj. Vandewiele

Mr Isenbaert
Vlaams Esperanto instituut
Blankenbergestr. 72
BRUGGE

Gilbert (sama adreso) kaj ankaŭ sendu bonan esperantan insignon por Nauwelaers Frans (sama adreso) ĉion de la sama bonhavoj. Koran dankon por la belaj glumarkoj, baldaŭ ni transendos denove uzitajn poŝtmarkojn al sinj. Maertens, kiun ni ĉiuj fervore kolektas. Frato Gamaliel bone rememoras la mendon, sed komprenas. Ni ne bone konas la kotizprezon de heroldo, sed se mankas monon ni nur devas sciigi nin. Salutu la bruĝajn samideanojn en nia nomo kaj koran dankon,

Fr. Gamaliël

V. D. Wiele Gilbert Huyghe Frederik

Nauwelaers François

Frato Gamaliël
1e Amandus gestelt
Beernem

J.M.+J.V. 2/I/59.

Tre estimata samideano,

Mi prenis la libereco por skribi al vi, pri donaco kiunm mi ricevis hieraŭ, de unu el miaj amikoj; eble ke ĝi povas helpi min en la realigo de mia revo: granda kaj impona biblioteko por la fratoj de mia kongregacio!

Certe la komenco estas tre eta sed ĉiu komenco estas malfacila. Hieraŭ, mi ricevis poŝtmarkojn en sufiĉe granda nombro, kaj mi tuj pensis al vi kiel la sola, kiu eble povas montri kaj eble helpdoni min por forvendi ilin, ĉar mi mem estas nur tre malklera rilate poŝtmarkoj. Se tio konvenas al vi, mi foje probus veni Bruggen, ĉe dato fiksita de vi, por ke ni povu priparoli la aferon. Mi ankaŭ ricevis malgrandan monsumon (500 fr.) por aĉeti libron aŭ librojn, kiujn mi samtempe povus elekti kun via sperta helpo, ĉar ili ne povas esti tro "mondaj", certe vi komprenas min, temas ja pri prunteblaj libroj por menaĥanoj, ĉu ne, kaj en la nuna stato, oni devas esti ankoraŭ tre singarda, por ne malfavorigi nia kongregacia estraro, ili nun estas tre favora rilate al Esperanto.

Mi tre dankas vin kaj ĉiuj brugaj samideanoj, por la multega helpo, kiuj ili tiel afabla kaj sindona donis al mi, jam tiel multfoje kaj precipe mi dankas vin por la donacitajn revuojn, kiujn mi jam forsendis al niaj institutoj: Eeklo, Temse, Zelzaete, Manage, Woluwe St. Lambert, Lummen, Hasselt, Brugge, kaj Maria Aalter kaj mi preskaŭ forgesis al Roeselaere. Ci tiu semajno sole, mi jam elpruntis 8 librojn, kaj ĉiam venas novajn demandoj. Kiam mi havos la novajn librojn, mi devove aperigos la liston en la frata revuo, kia impona propagando, ne nur en Belgujo, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj, de tio mi atendas multe, ĉar, kiam mi povas konvinki eĉ nur unu frato instruisto, mi praktike gajnis dekojn da junuloj, ĉar en la klaso, la frata vorto estas kompreneble konsiderata kiel la vero mem!

Kun tre koraj salutoj en la Sanktaj Korojn de Jesuo kaj Maria

Br. Gamaliël

Multajn salutojn de Alfons De Jaeu ~~...~~
Multajn salutojn de Vandewiele G.

ESPERANTO INTERNACIA LINGVO

**Les Frères de la Charité**

Institut Psychiatrique, St Martin, Dave

J.M. + J.V.

Kara Sinjoro Serentant,

Perdante ĉiujn insignojn de esperanto, mi devove demandas al vi, se vi povas sendi al mi unu aŭ du (mi ne konas la prezojn) insignojn por meti sur la vesto kaj surtuto.

Sed mi tamen preferas taŭgankaj fortan insigneton, ĉar aliaj ili ĉiam rompas kaj mi ilin perdas.

Mi rimarkas ke vi ŝanĝis de adreso, eble jam delonge, sed mi estas iomete fortranĉita de la movado, la valona popolo estas iom indiferenta pri la internacia lingvo kaj havas cetere tielan alian temperamenton ke mi ne ŝatas interkonatiĝi kun ili, ŝajnas al mi ke mankas laboremon kaj persistecon al ili. Eble ke mi eraras.

Elkore via kaj antaŭan dankon,

Fr. Gamaliël.